

## KURSOJ kaj renkontoj – COURS et rencontres

Université Populaire du Canton de Genève, 23 rue du Vuache,  
1201, Genève (derrière le collège Voltaire)

Tél: 022 339 05 00 – Fax : 022 339 05 09

E-mail : info@upcge.ch – Site Internet : www.upcge.ch

Kotizo : SFr. 50.00 Kursoj : po SFr. 50.00 por unu kurso (jare)

Ekde oktobro 2008, la kursoj de Esperanto okazos en :

Ecole de Commerce de Genève, Nicolas-Bouvier, rue de Saint-Jean 60

CH-1203 Genève, Tel.: 022 546 22 00

mapo: <http://www.edu.ge.ch/po/bouvier/admin/plan2.html>

Nivelo I, ĵaŭde de 18h00 ĝis 19h30

Nivelo II/III (gramatiko/ Konversacio), marde de 18h00 ĝis 19h30

### Konversacio rondo "Claude Piron"

Ĉiun ĵaŭdon ekde la 12-a ĝis la 13-a horo

Maison de Quartier de Plainpalais, 1 rue de la Tour, 1205 Genève

Informations : François Perret : 022 320 02 71

**Ĝeneva grupo : Esperanto-Grupo La Stelo**, Case postale 734, CH-1212 Grand Lancy 1. Kontakto : S-ino Christiane Sixtus retpoŝte: [ch.sixtus@bluewin.ch](mailto:ch.sixtus@bluewin.ch) . La grupo kunvenas ĉiun unuan mardon de la monato en la Maison des Associations, 15 rue des Savoises, Salle Jacquard, je la 20-a horo.

**Laŭzana grupo : Laŭzana Esperanto Societo**, Case postale 246 – CH-1000 Lausanne 22. Tel. 021-729 58 02 Interete : [www.alawa.ch/les](http://www.alawa.ch/les)  
Renkontoj ĉiun unuan lundon de la monato je la 20-horo en la Bufedo de la Stacidomo.

### CDELI – La Chaux-de-Fonds

Sabataj stud-aranĝoj

Didaktikaj stud-sabatoj : la trian sabaton de la monato  
por ĉiuj esperanto-lernantoj.

Kulturaj seminarioj : la unuan sabaton de la monato  
celas kleriĝon koncerne al la historio kaj literaturo de esperanto

de la 10-a matene ĝis la 17-a posttagmeze

Aliĝo : Nancy Fontannaz, telefone 021 728 31 27 au rete :

[nancyfontannaz@freesurf.ch](mailto:nancyfontannaz@freesurf.ch).

Partopren-kotizo : SF 15 (stud-sabato), SF 20 (seminario)

Adreso: Bibliothèque de la Ville, Progrès 33, CP. 3034,

2303 La Chaux-de-Fonds

Tel: 032 967 68 42, retadreso : [claudEGAcond@ne.ch](mailto:claudEGAcond@ne.ch)


### ANNECY, France

#### Annecy Esperanto

Responsable: Rolande HUDRY – 5 av. de Barral

74960 SEYNOD – Tél. 04 50 51 06 29

Les cours ont lieu le mercredi à partir de 16 h. – Salle Jumel – Quai des Clarisses (à côté de la Croix-Rouge).



**Asocio**  
**Espéranto - Genève - Régions**  
[www.esperanto-geneve-regions.info](http://www.esperanto-geneve-regions.info)

## LIMSALTANTA FOLIO

No. 2, 2008

La asocio Esperanto-Genève-Régions estas translima asocio kiu celas krei ligon inter grupoj de Esperantistoj en Pays de Gex, Lago Lemano, Rodanalpo kaj Ĝenevo, inter aliaj.

La Asocio organizas babilan rondon, La Lunda Grupo, ĉiun lundon ekde la 18-a horo ĉe la "Brasserie aux Cheminots", 7 rue des Gares, malantaŭ la stacidomo Cornavin en Ĝenevo (apud la Poŝtoŝtationo Montbrillant).

Tiuj kiuj deziras, povas kontribui simblan sumon de € 3.00 aŭ SFr 5.00 (jare) – donacoj ankaŭ bonvenas! Por membriĝi, nur demandu kaj vi ricevos membro-karton. Por informoj, vizitu nian retpaĝaron :

[www.esperanto-geneve-regions.info](http://www.esperanto-geneve-regions.info)

Il y a des pages en français! – There are pages in English!

aŭ kontakti nin

retpoŝte : [charmian@aliceadsl.fr](mailto:charmian@aliceadsl.fr) aŭ [mariezoesp@hotmail.com](mailto:mariezoesp@hotmail.com)

telefone : Charmian +33 (0)450 422 802 aŭ Marie +33 (0)450 421 956

kaj en Ĝenevo : Laure 0768 614836

Poŝtadreso : 36 parc du Bugnon, 01630 St Genis-Pouilly, Francio

Kontoj (Svisa Poŝtbanko CCP): 17-207679-3

Ĉekoj : Association Espéranto-Genève-Régions

Por informoj pri la Suisa Esperanto Socio : [www.esperanto.to/ses](http://www.esperanto.to/ses)

Kunprezidantoj: Mireille Grosjean, Grand-Rue 9, 2416 Les Brenets

Tel: 032 932 18 88 Retpoŝto : [mireille-grosjean@rpn.ch](mailto:mireille-grosjean@rpn.ch)

Dietrich Weidmann, PF 301, 8034 Zürich, Tel: 044 251 50 25

[info@esperanto.ch](mailto:info@esperanto.ch)

*Ni kore dankas niajn membrojn kaj geamikojn por ilia subteno.  
Nous remercions chaleureusement nos membres et amis pour leur soutien.  
We warmly thank our members and friends for their support.*

Asocio Espéranto-Genève-Régions  
kore invitas vin al ĝia Jarkunveno  
lundon, la 8-an de septembro 2008  
ĉe Brasserie aux Cheminots, 7 rue des Gares, Genève  
je la 19-a horo  
ooOoo

L'Association Espéranto-Genève-Régions  
vous invite chaleureusement à son  
Assemblée Générale Annuelle  
le 8 septembre 2008 à la Brasserie aux Cheminots,  
7 rue des Gares, à 19 heures

*Agado de la Asocio (sekvo de p. 2)*

La 1-an de julio, la Lundo Grupo festis sian 6-an datrevenon - jes, jam ses jaroj!. Ni feliĉe povis sidiĝi sur la teraso, kaj ĉirkaŭ 12 homoj ĝuis la feston. Bedaŭrinde, pro la bruego de la trajnoj, ni ne povis ludi; temis pri kartoj kun temvorto unuflanke (ekz. urboj) kaj aliflanke demando (Kiel estos la urboj en la estonteco?), entute ĉirkaŭ 10. La ideo estis paroligi la junulojn, sed verŝajne ili jam feris! Kompreneble, ni tamen multe babilis kaj la ĉeestantoj ricevis florojn antaŭ ol foriri.

Sabaton, la 9-an de aŭgusto, ni piknikis en Bois de la Bâtie, sovaĝa parko en Ĝenevo apud la rivero. Estis belega vetero, troviĝas multaj bestoj tie kaj ni ĝuis rigardi ilin, tamen kelkaj el ili nur dormis (porkoj el Vietnamio)! La anasoj banis sin, la pavo kriaĉis, granda aristokrata kapro kun grandegaj kornoj sidis sur roktrono kaj rigardis nin de alten, marmoto sidis apude kaj esperis esti fotita samtempe!

---

## **Agado de la Asocio**

### **Vizitoj**

Dimanĉe, la 6-an de julio 2008, ni vizitis la Muzeon de Arto kaj Historio kiu ĉi-somere gastigas parton de la konata kolekto Barbier-Muller - Praantikvaĵoj el Eŭropo kaj Azio, kaj ni ankaŭ vizitis alian ekspozicion pri loka arkeologio : la pralongantaro de la Ĝeneva regiono.

La Kolekto Barbier-Muller - pli konata por Afrikana arto - enhavas belegajn pecojn, tre diversajn, ekzemple, ĉevalo el centra Azio, kapo de Reĝo el Mezopotamio, pokaloj verkitaj el juvel-ŝtono, preskaŭ travideblaj, de antaŭ pli ol 4,000 jaroj : mirindaj artaĵoj, faritaj per simplaj iloj kaj kovritaj per fajne ĉizitaj desegnoj.

Domaĝe, pro la aĉega vetero la vizito de la Scienca Foiro (ekstere) estis nuligita kaj anstataŭe ni vizitis la Muzeon pri Natura Historio - tamen ankaŭ mirinda vizito! Ni vidis filmon pri kuracado de rivero kiu estis tro kontrolata de homoj, al kiu oni redonis siajn meandradojn kaj pli naturan aspekton, kaj replantis la bordojn. Inter aliaj mirindaj aferoj, ŝtonoj, birdoj en siaj nestoj kiun oni povis vidi per aparato, ni ankaŭ vidis filmon pri meduzoj (surprizaj bestoj!). La muzeo gastigas la du plej grandaj kristalojn elfosigitaj el la alpa montaro - gigantoj!

Kompreneble, unu vizito ne sufiĉas por ĉion vidi, kaj ni certe aranĝos alian.

➔ p.7

## ***lom da saĝeco***

Egaleco neniam alkondukas al milito.

L'égalité ne conduit jamais à la guerre. (Germana proverbo)

Se vi ne povas trairi, ĉirkaŭiru.

Si vous ne pouvez pas traverser, faites le tour. (Finlanda proverbo)

Ŝrumpigu grandajn kverelojn en malgrandajn kverelojn,  
Kaj malgrandajn kverelojn en nenion.

Réduire les grandes querelles en petites querelles,  
et les petites querelles en rien. (Ĉina proverbo)

## **Ŝerco :**

Hundo preterpasas laborperejon kaj vidas ŝildon:

"Ni serĉas sekretarion, kiu kapablas tajpi 12 paĝojn hore kaj regas fremdlingvon." La hundo eniras, kaj demandas, ĉu oni ankaŭ akceptas hundojn.

- Ĉu vi scipovas tajpi? - demandas la virino malantaŭ la tablo.
- Jes, - diras la hundo, kaj eksidas ĉe libera komputilo kaj rapidege skribas leteron.
- Nu bone. Kaj kiel pri fremdlingvoj?
- Miaŭ, miaŭ!

*Ni estas grupo de novaj esperantistoj, do eblas ke ni foje faras erarojn. Ni estos dankemaj se vi bonvolus atentigi nin prie!*

### *La premio-donaco, la 17-an de majo 2008*

La 17-an de majo okazis en Hotelo Bristol la donaco ceremonio de la premioj por la Konkurso pri Esperanto organizita per La Stelo. Mireille Grosjean parolis pri la konkurso kaj klarigis kion la juĝistoj serĉis kiam ili kontrolis la tekstojn de la konkursanoj. La tri gajnantoj estis Mélanie Maradan, Marion Rodriguez kaj Adrian Tanner, kiujn ni estis feliĉaj helpi ekparoli ĉe la Lunda Grupo. Mireille legis kelkajn liniojn de ĉiuj tekstoj de la tri gajnantoj, kaj substreki la altan kvaliton de la verkoj. Eĉ tiuj kelkaj linioj sufiĉis por tion montri al la aŭskultantaro - du tekstoj kaj unu poemo, ne nur perfekte verkita en Esperanto, sed ili traktis profundajn temojn, ekzemple, milito kaj paco. Estis plaĉe vidi ke tiom da junuloj interesiĝas pri Esperanto kaj kiom ili ŝajnis ĝui la konkurson.

*En français*

### *La cérémonie des prix du concours Espéranto, le 17 mai 2008*

Le 17 mai à l'Hôtel Bristol a eu lieu la cérémonie des prix du Concours de l'Espéranto organisé par La Stelo. Mireille Grosjean (co-Présidente de la Société Suisse d'Espéranto et juge) a dit quelques mots sur le concours, en expliquant ce que les juges cherchaient quand ils ont lu les textes des participants. Les trois gagnants étaient Mélanie Maradan, Marion Rodriguez et Adrian Tanner, que nous avons été heureux d'aider avec la langue parlée au Groupe du Lundi. Mireille a lu quelques lignes de chaque texte des trois gagnants, et elle a souligné la haute qualité des textes. Même ces quelques lignes étaient suffisantes pour le montrer à l'auditoire - deux textes et un poème, non seulement parfaitement écrits en Espéranto, mais traitant de thèmes profonds, par exemple, la guerre et la paix. C'était agréable de voir qu'autant de jeunes s'intéressent à l'Espéranto et combien ils semblaient s'amuser en participant au concours.

### **Asocio Kokopelli - biodiverseco de organikaj semoj**

Asocio Kokopelli batalas por protekti la rajton de ĉiuj kreski legomojn kaj aliaj plantoj ekde tradiciaj semoj, por certigi biodiversecon kaj protekti malaperantajn specojn. Ili ricevas semojn de membroj de Kokopelli kiuj kreskas ilin en iliaj ĝardenoj, kaj distribuas ilin al kamparaj komunumoj en malriĉaj landoj

Ili jam plurfoje estis monpunitaj de la franca registaro, sed malgraŭ tio, daŭrigas la lukton.

Adreso : Oasis, 131 impasse des Palmiers 30100 Alès. Francio

Telefono : 04 66 30 64 91 / 04 66 30 00 55

Retejo : [www.kokopelli.asso.fr](http://www.kokopelli.asso.fr)

Por mendi semojn rete : [semences@kokopelli.asso.fr](mailto:semences@kokopelli.asso.fr)

### La Bona Lingvo : Borde de l' lago Lemano de Victor Hugo

Hodiaŭ, mi promenadis borde de la lago. La luno estis preskaŭ plena. La alta kresto de Meillerie plenigis la horizonton.

Funde, la Oche-dentmontoj mordis ĉarman perl-grizan nubon kaj ĉiuspecaj montoj fuĝis tumulte en vaporon. Admirinda lunlumo kvietigis la sovaĝecon de la pejzaĝo. Mi marŝadis apud la ondoj.

Estis la nokto de la ekvinokso. La lago havis tiun febran agitadon kiu, je la epoko de grandaj tajdoj, kaptas ĉiujn akvojn kaj tremetigas ilin. Etaj ondoj momente invadis la ŝtonan vojeton kie mi staris, kaj malsekigis la plandon de miaj botoj.

Okcidente, la lago, kaŝita sub nebuloj, aspektis grandega ardezo. Voĉbruo aŭdiĝis de la urbo kaj mi vidis eliri el la haveno de Vevey ŝipon irantan al fiŝkaptado.

Tiuj barkoj de Lemano havas formon, kiun donis al ili la lago mem. Ili estas ekipitaj de du "latinaj" veloj ligitaj inverse al du malsamaj stangoj por kapti ambaŭ grandajn ventojn, kiuj blovegas sur Lemano.

Tage sub suno, la lago bluas, la veloj blankas, donante al la barko la aspekton de muŝo, kiu kurus sur la akvo kun flugiloj levitaj. Nokte, la akvo grizas kaj la muŝo nigras.

Mi do rigardis tiun muŝegon, kiu marŝis malpapide al Meillerie, siluetante sub la lunlumo siajn travideblajn flugilojn.

La lago murmuris ĉe miaj piedoj. Ŝvebis impona paco en tiu granda naturo. Estis grandioze kaj dolĉe.

Kvaronhoron poste, la barko estis for, la febro de la lago kvietigis, la urbo endormiĝis. Mi estis sola, sed mi sentis vivi kaj revadi la tutan kreitaron ĉirkaŭ mi.

Ce soir, je me suis promené au bord du lac. La lune était presque dans son plein. La haute crête de Meillerie emplissait l'horizon.

Au fond, les dents d'Oche mordaient un charmant nuage gris-perle et toutes sortes de montagnes fuyaient tumultueusement dans la vapeur. L'admirable clarté de la lune calmait tout ce côté violent du paysage. Je marchais au bord du flot.

C'était la nuit de l'équinoxe. Le lac avait cette agitation fébrile qui, à l'époque des grandes marées, saisit toutes les masses d'eau et les fait frissonner. De petites lames envahissaient par moments le sentier de cailloux où j'étais, et mouillaient la semelle de mes bottes.

À l'ouest, le lac, perdu sous les brumes, avait l'aspect d'une énorme ardoise. Des bruits de voix m'arrivaient de la ville et je voyais sortir du port de Vevey un bateau allant à la pêche.

Ces bateaux pêcheurs du Léman ont une forme que le lac leur a donnée. Ils sont munis de deux voiles latines, attachées en sens inverse à deux mâts différents, afin de saisir les deux grands vents qui s'engouffrent dans le Léman par ses deux bouts.

Au jour, au soleil, le lac est bleu, les voiles sont blanches, et elles donnent à la barque la figure d'une mouche qui courrait sur l'eau, les ailes dressées. La nuit, l'eau est grise et la mouche est noire.

Je regardais donc cette gigantesque mouche qui marchait lentement vers Meillerie, découpant sur la clarté de la lune ses ailes membraneuses et transparentes.

Le lac jasait à mes pieds. Il y avait une paix immense dans cette immense nature. C'était grand et c'était doux.

Un quart d'heure après, la barque avait disparu, la fièvre du lac s'était calmée, la ville s'était endormie. J'étais seul, mais je sentais vivre et rêver toute la création autour de moi.

Au bord du lac Léman, 21 septembre 1838  
Traduko de Mad Mevo

## Ĝeneva printempo

### *Simpozio pri Lingvaj Rajtoj, la 24-an de aprilo 2008*

Tiu kunveno (kiu estas raportita pli amplekse aliloke) estis feliĉa okazaĵo, pro la bela vetero, la belega loko - Unuiĝintaj Nacioj en ĝia pacema parko - kaj ĉefe pro la intereso kaj atento kiujn montris la ĉeestantoj. La simpozio celebris la Centjariĝon de UEA kaj la 60-a Datreveno de la Deklaro de Homaj Rajtoj - UEA volis emfazi lingvajn rajtojn kiujn ĝi subtenas ekde longe.

La ĉef-preleganto, Profesoro Tove Skutnabb-Kangas, fama lingvistikisto, parolis pri "lingvo genocido" kaj ŝi donis tre bonan ekzemplon de perdo de scio kiam lingvo mortas. Temas pri sciencistoj en norda skandinavio kiuj malkovris ke salmonoj povas ekovi en malgrandaj riveroj - ne nur grandaj. Ili eldonigis artikolon en scienca revuo, sed poste, homoj de la Samia (Saamia) popolo kontaktis ilin por diri "Ni ja povis diri tion al vi - eĉ estas vorto en nia lingvo kiu signifas 'eta rivero kie salmonoj ekovas'".

La gastparolanto, Profesoro François Grin, ekonomisto, parolis pri nova projekto por malaltigi la kostojn de traduko en Eŭropa Unio, pere de kreado de grupoj de lingvoj laŭ la familio, por malgrandigi la nombron de traduklingvoj. Posttagmeze, tri prelegantoj parolis nome de indiĝenaj popoloj en Kolombio, Alasko kaj Ĉilio. Ili parolis pri problemoj de tiuj popoloj prezervi la gepatran lingvon, ekzemple kiam oni devigas ilin sendi la infanojn al ŝtataj lernejoj, kelkfoje 20 kilometrojn for de la domo. Ili ĉiuj tri parolis emocie kaj kortuŝe. Lingvaj rajtoj ŝajne estas neglektitaj en la kadro de homaj rajtoj.

### *LibroFoiro, de la 30-a de aprilo ĝis la 4-a de majo 2008*

La LibroFoiro ĉi-jare estis tre bela, kun la Ekspozicio pri la Oro de la Faraonoj, budo pri ortografio en formo de ĝardeno kun serĉado de indicoj, tiu de la Muzeo pri Naturhistorio kun travidebla abelujo kaj du vespertoj - kaj montojn da libroj!

La temo de la Alternativa Vilaĝo estis "Sano kaj Klimataj Ŝanĝoj" kaj okazis multaj debatoj kaj multaj filmoj estis montritaj. Por fari ligon inter tiu temo kaj Esperanto, mi faris broŝuron pri klimataj ŝanĝoj kaj perdo de biodiverseco kaj de lingvoj - kaj kompreneble mi uzis la ekzemplon de Tove Skutnabb-Kangas por ilustru kiel scio perdiĝas kun lingvo. Ankaŭ okazis debato pri "Esperanto - al kio ĝi utilas". Sufiĉe granda homamaso ĉeestis ĝin, kaj ni havis la plezuron aŭskulti Mireille Grosjean, Kunprezidentino de la Svisa Esperanto Societo, Antonio Leone, doktoro pri lingvistiko ĉe la Universtato de Ĝenevo, kaj ankaŭ du el la gajnantoj de la konkurso pri Esperanto organizita per La Stelo, Mélanie Maradan kaj Adrian Tanner. Mireille ankaŭ kunportis belan banderolon, do neniu dubis pri la temo!

Mireille klarigis la utilecon de Esperanto en lando kies nacia lingvo estas malfacila, kaj kie la angla ne helpas - ekzemple Japanio. Antonio substrekis la gravecon de Esperanto kiel pontlingvo, ekzemple inter indiĝenaj popoloj. Pontlingvo faciligas komunikadon inter tiuj homoj, ĉar ili parolas ne centojn da lingvoj, sed milojn! Mélanie kaj Adrian priskribis siajn spertojn lerni la lingvon en kvar monatoj - kaj oni ja povas diri ke ili sukcesis!

Nia budo situigis apud la elirejo de la Ekspozicio - ŝance ĉar multe da homoj preterpasis. Ni havis du aferojn kiuj kaptis iliajn okulojn - brilajn dekoraĵojn el arĝenta kaj kolora papero kiuj turnis spirale laŭ la ventblovo; kaj tradukkludon : simpla frazo sur papero : "La kato trinkis lakton, kaj dormas" - kun la titolo : Aldonu vian lingvon! kaj kelkaj linioj por skribi ĝin. Kiam ni metis ĝin sur la antaŭa parto de la tablo kun skribilo, la homoj vidis ĝin de fore kaj scivolis. Krom la svis-alemana (3 dialektoj), la franca, la germana, la hispana, angla - ni kolektis lingvojn de la tuta mondo : la albana, la ĉina, la bulgara, la araba (3 malsamaj), etiopa (2), la makedona, la vietnama, la kreola (Haitio), ŭolofa, inter aliaj - vidu suben!

Ĉi-jare, ni rimarkis ke la homoj ĝenerale jam sciis kio estas Esperanto kaj ofte venis por demandi kie ili povas lerni. Pli kaj pli da junuloj interesiĝas pri la internacia lingvo,

- |   |                                  |
|---|----------------------------------|
| 1. itala                                  | 22. svis-alemana (berna)         |
| 2. sveda                                  | 23. araba (egipta)               |
| 3. germana (verŝajne slango)              | 24. tibeta                       |
| 4. albana                                 | 25. greka                        |
| 5. hispana                                | 26. itala                        |
| 6. germana                                | 27. portugala                    |
| 7. angla (du)                             | 28. franca                       |
| 8. germana (la du verboj en la estanteca) | 29. etiopa (amharika)            |
| 9. bulgara                                | 30. etiopa (tigrigna)            |
| 10. vietnama                              | 31. svis-alemana                 |
| 11. portugala                             | 32. bengali                      |
| 12. alsaca (du malsamaj)                  | 33. svis-itala (tesina dialekto) |
| 13. ŭolofa                                | 34. nederlanda                   |
| 14. farsi (persa)                         | 35. germana                      |
| 15. ĉina (mandarena)                      | 36. araba (klara, egipta)        |
| 16. kreola (haita)                        | 37. angla                        |
| 17. franca                                | 38. hispana                      |
| 18. svis-alemana (St Gallois)             | 39. franca                       |
| 19. makedona                              | 40. greka                        |
| 20. rusa                                  | 41. hispana                      |
| 21. bulgara                               | 42. svis-alemana (ŝvica)         |